

Pola

Esperantisto

Esperantysta Polski

XXXI JARO

NRO 11

NOVEMBRO 1937

ELDONANTO — WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ — REDAKTORZY

PROF. DR ODON BUJWID — MGR TADEUSZ HODAKOWSKI

Aperas la 20-an de ĉiu monato. Redakcian materialon oni petas sendi ĝis la 10-a de ĉiu monato. La redakcio estas rajtigita laŭ bezono ŝanĝi la tekston de manuskriptoj.

JUBILEA KONGRESO DE ESPERANTO

Warszawa 7—14 aŭgusto 1937.

(Daŭrigo).

Malfermo de la Blindula Kongreso.

La saman tagon je 17-a horo en la Ŝtata Blindulinstituto okazis la malfermo de la XIV Kongreso de Univerala Asocio de Blindaj Organizaĵoj.

Kortuŝe aspektis la salono, en kiu amasiĝis diverslandaj geblinduloj por preparoli en komuna lingvo siajn aferojn, por pridiskuti la eblecojn plibonigi sian sorton kaj por pritrakti la plian diskreskon kaj etendiĝon de sia tutmonda organizaĵo, tiom utila por la blindularo.

Venis ankaŭ reprezentantoj de pola registaro, de franca ambasadoro, de diversaj blindulorganizaĵoj kaj reprezentantoj de la Jubilea Kongreso.

La Kongreson malfermis la vicprez. de LKK s-ro Klimecki, salutante la reprezentantojn de la registaro, blindulinstituto kaj urbo kaj dankante ilin por la grandega helpo kaj apogo de Blindulkongreso.

Post salutparoladoj de la oficialaj delegitoj de la Blindulinstituto kaj de pola registaro estas elektita la kongresestraro: Honora prezidanto - pola sejmdeputito majoro Wagner, prezidanto - kapitano Silhan, prez. de UABO,

vicprez. - pastro van den Bosch, kaj reprezentantoj de diversaj landoj. Sekretariis s-ino Thilander.

La prezidanto kapitano Silhan dankas kore al ĉiuj, kiuj helpis sukcesigi la aranĝon de la Kongreso.

La Kongreso kun varma emocio aŭskultas belan leteron de la konata blindulpioniro Harald Thilander, kiu skribas i. a., ke li ne havas korpon, sed nur spiriton, kiu ebligas al li labori por la blindulafero.

Poste faras belan kaj profundsentan paroladon en franca lingvo la sejmdeputito majoro Wagner. Li bedaŭras, ke li ankoraŭ ne povas paroli Esperanton. Li substrekas la gravan signifon de la lingvo internacia Esperanto por la afero de la tutmonda paco. La internaciaj unuiĝoj de la militpartoprenintoj FIDAC kaj CIAMAC laboras daŭre por la paco, ĉar nur tiuj, kiuj partoprenis la militon kaj travivis ĉiujn ĝiajn teruraĵojn, scias, kiom bezona estas la paco tutmonda. Ni, blinduloj, estas malfortaj fizike, sed ni laboras morale. La fortoj moralaj estas tre valoraj. La blinduloj devas labori por la paco. Kortuŝe la parolanto fine de sia parolado rakontas, ke li mem estis vidanto kaj dum la mi-

lito li perdis la vidpovon. Sed li ne sentas nun tiun perdon, ĉar li amas sian patrujon, ĉar li amas ĉiujn popolojn. La morala ĝojo estas fortega vivinstigilo.

Prez. Silhan tradukas la paroladon de majoro Wagner Esperanten. Tondraj aplaŭdoj de la tuta aŭdantaro sekvas ĝin.

Poste salutis reprezentantoj de diversaj polaj blindulorganizaĵoj kaj ankaŭ delegitoj de esperantistaj blinduloj diverslandaj. Speciale atentinda estis la salutparolado de Dro Kempinski, prezidanto de pola societo „Lanterno“, protektanta la blindulojn kaj zorganta pri ili.

Nur por unu momento la imitinda agrablega harmonio de la Kongreso estis interrompita per falsa tono, ŝiranta la orelojn kaj korojn. Prezidanto de unu el la polaj blindulorganizaĵoj ekskolonelo Kłobukowski salutis la Kongreson en maniero, ne tro bone atestanta pri lia indeco okupi tiom gravan poston socian. Li deziris al la Kongreso, ke ĝi fine ion faru, ĉar la ĝisnunaj blindulkongresoj nenion faris, kaj ĉefe li deziris, ke la Kongreso ne havu ion-ajn komunan kun Esperanto, kiu - laŭ lia klera opinio - ne estas bezona por blinduloj.

Nur la granda kulturo de la organizintoj kaj de la kongrespartoprenintoj savis tiun gaston de forpelo el salono, kiun li estis spertinta en ĉiu alia medio. Ni aldonu, ke li mem ne estas blindulo kaj eble tio ankaŭ estis la kaŭzo, ke li ne komprenas la blindulojn, por kiu Esperanto estas mirakla ilo, parte kompensanta la perdon de l'vidpovo.

Per fortaj kaj decaj vortoj la meritita pola Esperanto-pioniro prof. Bujwid deklaris, ke tiu sinjoro ne reprezentas la veran polan spiriton kaj ke li ne meritas respondon je siaj sensencaj diraĵoj kontraŭ nia bela lingvo.

Kvazaŭ por firmigi tiun diron de prof. Bujwid per alta aŭtoritato de la ŝtato majoro Wagner sciigis al la Kongreso la ĝojigan novaĵon, ke la Prezidanto de Pola Respubliko prof. dro Mościcki ĵus distingis la redaktoron de la „Esperanta Ligilo“ kaj nelacigeblan blindulaganton Harald Thilander per la alta pola ordeno „Polonia Restituta“. Senfinaj aplaŭdoj sekvis tiun novaĵon kaj la Kongreso decidis esprimi al pola ŝtatestro sian profundan dankon pro la meritita honorigo de la eminenta Esperanta blindulpioniro.

Kiom senfine eta kaj sensignifa estis la sentakto de la malvastpensa „salutinto“ kompare kun la inda deklaro de prof. Bujwid kaj la alta rekono, montrita de la ŝtatprezidanto, la honora protektanto de nia Jubilea.

La blindulkongreso, kiu poste ankoraŭ havis siajn laborkunsidojn, pridiskutis serioze kaj afere diversajn demandojn, rilatantajn la blindulojn, i. a. pri fakinstruado de blinduloj en diversaj metioj, fabrikoj, pri pligran-

digo de la Braille-bibliotekoj kaj multajn aliajn.

Tre interese raportis pri la stato de blindulprizorgo en Japanujo s-ro Nakahara. La nombro de blinduloj en Japanujo atingas 76.000. Ili havas siajn 90 blindulinstitutojn, el kiuj 50 ŝtataj kaj 40 funkciaj dank' al la monferoj de la loĝantaro. En lernejoj studas 4.500 blindaj infanoj.

En la aliaj salonoj de la Blindulinstituto, kie okazis la kunvenoj de la Kongreso, estis organizita tre interesa blindulekspozicio, enhavanta i. a. aron da praktikaj teknikaj helpiloj por blinduloj. Speciale menciindaj estas la t. n. „Parolanta libro“, aparatoj por desegnado kaj kalkulado, ŝako por blinduloj kaj multaj aliaj aĵoj.

La modela organizo de la Blindula kongreso kaj la vera harmonio de ĝiaj partoprenintoj estis imitinda ekzemplo por niaj Esperantaj kongresoj. Bedaŭrinde la generaloj de nia movado ne venis al la blindula kongreso. Ili estis ja tro okupitaj per la organizaj disputoj...

Prelego pri la Majstro.

Je la 18-a horo la konata propagandisto s-ro Glück, iam en Germanujo, nun rifuĝinta al Nederlando, prelegis pri „Zamenhof kiel scienculo kaj filozofa“. La prelego, farita kun bona oratora talento, forte impresis la multnombrian ĉeestantaron kaj meritis la ricevitajn aplaŭdojn.

Malfermo de la Jubilea Ekspozicio.

La saman tagon je 19-a horo en lernejo ĉe strato Karowa proksime de la Kongresejo senbrue estis malfermita la Jubilea Ekspozicio.

Estis bona ideo de LKK aranĝi pro la jubileo de nia lingvo tiun grandskalan Ekspozicion por montri al la neesperantista publiko la ĝis nun atingitajn sukcesojn de Esperanto kaj por ebligi al la Esperantistoj mem fari kvazaŭ bilancon de la ĝisnunaj penadoj kaj starigi planon por plua agado.

Senbrue malfermiĝis la Ekspozicio. Malfermiĝis mem, ĉar denove la estroj ne venis. Nur la popolo Esperanta plenigis la salonojn kaj koridorojn, en kiuj okazis la Ekspozicio. Neniaj paroladoj, neniaj kutimaj formalaj kaj ceremonioj. Malfermiĝis simple la pordoj kaj englutis la bruantan maron esperantistan.

Tio, kion ekvidis la verdstelanoj dum la Ekspozicio, parolis al ili pli efike kaj pli profunden eniĝis iliajn mensojn kaj korojn, ol plej elokventaj paroladoj.

La impreso de la Ekspozicio, frukto de tre diligenta kaj sinofera laboro de nia brava pola samideano Dro Marek Wajsblum, estis bonega.

Plej grandan intereson altiris la „Zamenhofa ĉambrego“. Kun vera emocio oni rigardis tie la skribtablon de la Majstro kun la kutimaj objektoj sur ĝi. Jen kuŝas sur la tablo la paperujo de Dro Zamenhof kaj jen lia stampilo sur malfermita inkkuseneno. Apude sur alia tableto la malnovmoda Ideal skribmaŝino de la Majstro, siatempe speciale por li farita kun Esperantaj supersignitaj literoj de la fabriko Seidel kaj Neuman. Ĉio faras tiom fortan impreson, ke ŝajnas al ĉiu - jen post momento malfermiĝos la pordo, eniros la bonkora doktoro-idealisto, eksidos ĉe la tablo kaj rekomencos la interrompitan laboron. Bedaŭrinde, tiaj pensoj, nevolaj kaj subkonsciaj, estas nur infancaj revoj pri miraklo...

Sur muroj en Zamenhofa ĉambrego pendas bildoj de la Majstro el unua periodo de Esperanto, fotoj de lia familio, de gepatroj kaj geavoj, de unuaj fidelaj adeptoj, naskiĝ-atesto, invito al la edziĝfestoj de Zamenhof, lia kuracista diplomo, korespondado Esperanta kun la edzino, kiam la Majstro estis devigita komence serĉi sian vivpanon en malgrandaj urbetoj for de sia familio. Aparte ni vidas la atestojn pri la unuaj sukcesoj de la Majstro. Kongresbildoj, honorigoj, ordenoj, kortuŝaj donacoj, bildo kun propramana subskribo de Carmen Sylva. Jen ankaŭ bildoj de Białystok, lia urbo de naskiĝo kaj de unuaj studjaroj en la reala lernejo. Granda geografia karto montras ĉiujn lokojn en la mondo, kiuj estas ligitaj kun la vivo de Zamenhof: urbo de naskiĝo, de plua studado, lokoj de penado por la vivo, lokoj de liaj triumfoj - la kongresurboj ktp. Interese estas ankaŭ la modelo de skribmaŝino, eltrovita de la Majstro, por kiu li akiris patenton en Germanujo. Nemultaj Esperantistoj verŝajne scias pri tiu eltrovaĵo de la Majstro. La kolekton de Zamenhofaĵoj, kiu montras pian respekton de la organizinto al la memoro de la Majstro, finas la lastaj manuskriptoj de Dro Zamenhof kaj lia testamento.

En aliaj ĉambroj estis dense pendigitaj sur la muroj bele aranĝitaj kartonoj, impresive ilustrantaj la disvastiĝon de nia lingvo en servo de komerco, turismo k. a. Tiuj kartonoj estis ĉiuj aranĝitaj de la Ekspozicia Servo de Universala Esperanto-Asocio en Genevo. La Centra Oficejo de UEA sendis al Varsovio grandan keston kun 150 kg da ekspoziciaĵoj, sisteme ordigitaj. La administranto de UEA s-ro Hans Jakob mem helpis surloke en Varsovio la aranĝojn, veninte kelkajn tagojn antaŭ la Kongreso por fari tion.

Ni vidas tie krom la multnombraj komercaj kaj turismaj presaĵoj de la tuta mondo ankaŭ plaĉajn seriojn de Esperantlingvaj oficialaj poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj, eldonitaj de la Poŝtadministracio de Hungarujo, Brazilo, Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Danzigo, Lichtensteino, Sovet-Unio kaj Nederlando. Forte impresas ankaŭ la kolekto de Cefecŝlosiloj en plej diversaj - eĉ egzotikaj - lingvoj. Interesas ankaŭ la Jarlibroj de UEA de la malgranda unua en 1908 ĝis la nunjara Jubilea.

En aparta ĉambro estas kolektitaj Esperanta literaturo originala kaj tradukita el plej diversaj lingvoj, kiel ankaŭ la scienca kaj faka verkaro. Tiu fako estas aranĝita kun la helpo de diverslandaj samideanoj, kiuj responde al la alvoko de LKK sendis riĉan ekspozicimaterialon.

Polujo, la lando de Zamenhof, havis apartan ĉambron, kie ni kun kortuŝo vidis la rememoraĵojn pri la unuaj polaj pioniroj de Esperanto. Apartan intereson vekas la dokumentoj pri la iama rondeto de Esperantista Junularo. Protokolo de ĝia unua kongreseto (kaŝa!) estas subskribita de Tadeo Kasprzycki, la nuna pola militministro. Krom tiu historia dokumento pendas sur la muro ankaŭ fotografiaĵo de tiu grupo de la jaro 1907. Kun korpremo ni vidas tie inter aliaj partoprenintoj la vigan junulon Jan Mędrkiewicz, tiam komencantan sian Esperantan laboron. Bedaŭrinde, nia meritita pioniro Dro Mędrkiewicz ne ĝisvivis la Jubileon, por kiu li kun sama juneca fajro kiel antaŭ 30 jaroj, arde laboris. Pola literaturo, tradukita en Esperanton, estis nekomplete montrita en la ekspozicio, kio estas eble la sola riproĉinda detalo. Tion certe kulpas pli la samideanoj precipe en pola ĉefurbo, disponantaj pri tiu materialo kaj tamen ne pruntintaj ĝin al la aranĝanto de la ekspozicio.

La ekspozicio estis malfermita dum la tuta kongresa semajno. Ĝi estis multenombre vizitata ankaŭ de neesperantista publiko, des pli, ke la eniro estis senpaga por ĉiuj. Ĝia propaganda signifo estis sendube granda. Vizitis ĝin ankaŭ la oficiala reprezentanto de la pola ministerio por klerigado. Li esprimis sian plenan kontentecon kaj diris, ke nur post la vizito de la ekspozicio li havas la ĝustan imagon pri la amplekso kaj signifo de la Esperanta movado.

La aranĝinto de la ekspozicio Dro Wajsblum meritas grandan dankon pro sia utila laboro.

Estus bone konservi la materialon pri la Majstro, unuafoje montritan dum tiu ekspozicio, por fondi en Varsovio Zamenhofmuzeon. Ankaŭ tre utilis prilabori detale tiun materialon kaj eldoni ĝin en libroformo kun reproduktaĵoj.

Festo de Veteranoj.

Program-kaj impresoriĉa estis la dimanĉa kongresa tago. Kronis ĝin vespere la Festo de Veteranoj. Tiu aranĝo por longe restos en la memoro de ĉiuj ĉeestintoj.

La salono de la Kongresejo estis plenplena, kiam nia malnova samideano Roman Sawkowicz (iam skribinta viglajn felietonojn, subskribitajn „S. A. Koviĉ“), anstataŭante prof. Bujwid, malfermis la Feston.

Li klarigis, ke speciala sekcio de LKK sub prezido de alia konata malnova samideano advokato Litauer diligente laboris dum longa tempo kaj fiksis liston de personoj, al kiuj oni aljuĝis Jubilean Stelojn. Samideanoj, kiuj aliĝis al la aktivaj batalantoj por la lingvo internacie antaŭ la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne - sur - Meren 1905, ricevas oran stelon; samideanoj, aliĝintaj antaŭ la VIII-a en Krakovo en 1912 (jubileo de 25-jara ekzisto de Esperanto) ricevas arĝentan stelon. Ĉiu stelo estas numerita, same kiel la arta diplomo, apartenanta al ĝi.

Post tiuj enkondukaj vortoj de la prezidanto ekstaras sur la podio Julio Baghy.

Estas neeble transversi sur paperon la majstran vortotorenton de Baghy. Li superis sin mem en tiu belega improvizado.

Kiam li parolis pri la malfacilega vojo de la unuaj pioniroj de Esperanto, kiam li parolis pri tiuj, kiuj nun, laborante por nia movado, devas memori pri la sinoferema kaj persista agado de la pioniroj, - ĉiuj aŭskultantoj sentis la profundan sincerecon de la parolanto kaj vidis, ke li interne travivas ĉion.

Ne Baghy, la artisto, faris la paroladon. Baghy, la homo kaj Esperantisto, elploris sian animon kaj koron, dolorantajn pro la nuna malpaco kaj disrompo en la movado.

En la momento, kiam Baghy en sia parolado komencis menci la nomojn de la mortintaj unuaj batalantoj por nia afero, la orkestro ekludis la majestatan Funebran Marŝon de Chopin. Ĉiuj ekstaris, emociitaj, enpenisitaj kaj profunde tuŝitaj. Kaj, akompanate de la sonoj de la Funebra Marŝo, Baghy daŭrigis la improvizacion antaŭ la staranta mute reprezentantaro de la tuta homaro,

„Niaj mortintoj“ - faladis en la salonon la vortoj de Baghy, trapikante la ĉiam poten-

ciĝantajn sonojn de la Funebra Marŝo - „revenas nun por momento al ni, ne por timigi nin, ĉar niaj mortintoj restis ja vivantaj en siaj postlasitaj verkoj en la rezulto de siaj laboroj. Ili venis por partopreni en nia festo jubilea, por doni al ni kuraĝon por la plia batalo, por firmigi nian kredon kaj fidon pri la estonteco.

La plej glora nia karmemora Majstro Dro Lazaro Ludoviko Zamenhof proksimiĝas jen al ni kun siaj plej energiaj kaj sindonaj disĉiploj: jen Antoni Grabowski, la patro de la Esperanta poezio, Théophile Cart, la senlaca propagandisto; Aleksander Brzostowski, Adam Zakrzewski, la unuaj pioniroj de la Esperanta movado, Hector Hodler, la fide-la batalanto por nia ideo; Aleksandro, Feliks kaj Leono Zamenhof, kiuj kune kun la Majstro travivis ĝojon kaj malĝojon de nia ideo kaj movado.

Iras ankoraŭ al ni multaj aliaj pioniroj, kiuj ĝis la fino de sia vivo helpis batali por Esperanto.

Kaj jen venas ankaŭ miloj da niaj sennomaj batalintoj, la sinoferaj nekonataj soldatoj de nia kulturmovado. Estas kun ni tiuj miloj, kiuj havis la saman ardon de entuziasmo, kiun havis la gvidantoj, kaj kiuj same ne hezitis doni la plej valoran parton de sia intelekto, kiel la plej famekonatoj.

Honoron al niaj mortintoj!

Vivu ilia memoro en la posteularo, ili restu modeloj por ni kaj inspiru al ni harmonian laboron por finkonstrui la altaron de la Homa Kompreno!“

Malsekaj estis la okuloj de la ĉeestantoj, kiam Baghy finis.

Sekvis la disdono de diplomoj kaj de la honoraj steloj. Oni vokis laŭalfabete ĉiujn nomojn, eĉ tiujn de la pioniroj, kiuj ne povis veni al la Kongreso. Varmaj aplaŭdoj sekvas la legadon de la nomoj. La ĉeestantaj honorigitoj venas al la podio sinsekve por ricevi el la manoj de la prezidanto tiujn esprimojn de danko, ŝuldata al ili de la Esperantistaro.

Bruaj aplaŭdoj ektondras, kiam estas elvokataj la Zamenhofanoj: la filo de la Majstro Dro Adam Zamenhof kaj la filinoj Dro Zofia kaj Lidia. Jen denove ekaŭdiĝas longedaŭraj aplaŭdoj kaj vivukrioj, kiam estas vokata la nomo de profesoro Bujwid. (daŭrigota).

Nia Samideano Ludoviko Krysta, festas en tiuj tagoj sian 60 naskiĝtagon.

Korajn bondezirojn!

O. Bujwid.

AL SAMIDEANO ROLLET DE L'ISLE EN PARIZO.

Letero malfermita de dro Antoni Czubryński responde al la rimarkoj en Pola Esperantisto, nro 10.

Laŭ viaj rimarkoj estas du taktikoj:

La mia: Interŝtata Esperanto Akordo (IEAk):

Ses ŝtatoj reciproke promesas: ni enkondukos devige Esp-on en la lernejoj, se aliaj ŝtatoj la samon promesos fari ĉe si.

La via:

Unue unu ŝtato devige enkonduku Esp-on en la lernejoj. Tiam aliaj sekvos ĝian ekzemplon.

Nune la legantoj demandos: kiu taktiko estas pli bona?

Jen mia respondo:

Kontraŭe al sam. Rollet de l'Isle, kiu diras „Nur per tiu metodo ni sukcesos“ mi deklaras: nenie, neniam al neniu mi diris, ke nur unu vojo gvidas al nia komuna celo: enkonduko de esp. en la lernejojn. Se en iu lando la cirkonstancoj estas tiel escepte favoraj, ke la apliko de la taktiko de sam. Rollet de l'Isle prezentas nenian riskon, tiam oni apliku tiun ĉi taktikon, kiun mi nomus „maksimuman“. Sed, se la pedagogiaj faktoroj malkonsentus kun tiu ĉi propono, tiam oni postulu minimume aliĝon de tiu ĉi ŝtato al IEAk, kiu prezentas por ili nenian riskon kaj kostos ilin neniom.

Kio estas tamen pli facile akirebla?

Laŭ mi la aliĝo de ŝtato al IEAk. Kontraŭe: la propono de Rollet de l'Isle prezentas ian danĝeron por la ŝtatoj. Ni imagu, ke iu ŝtato faras laŭ tiu ĉi propono. Kio tamen okazos, se aliaj ĝin ne sekvos, aŭ sekvos post tre granda tempo. Antaŭvideble ekstaros la opozicio ne kontraŭ esperanto, sed kontraŭ grandskala instruado. Oni diros: „por kio estas al nia lando necesa tiel larĝa instruado, se aliaj landoj la samon ne faras“? kaj ne kontraŭbatalante esperanton, oni reduktos ĝin al la efektiva stato de bezonoj. Io simila okazis jam en 1908 en insulo Samos sur Egea Maro, kie escepte favora por esp. insulestro enkondukis ĝin en ĉiujn lernejojn de la insulo. Post lia mortigo falis tuta lia reformo, kiu cetere dum ĝia ekzisto havis nenian influon je eĉ nur najbaraj urboj, se ni silentus jam pri la ŝtatoj. Simile, kiel proponas sam. Rollet de l'Isle, oni volis proponi enkondukon de esp. pere de bavara parlamento. Sed la propono ne nur ne sukcesis, sed eĉ montris tutan nepreparatecon de la deputitoj por diskuti pri esp. problemo.

Sam. Rollet de l'Isle diras, ke „demokratiaj registaroj ne estas daŭraj estaĵoj“. Jes! Certe! Sed ĉu eĉ tia-grade nedaŭraj, ke ĉiu decido de unu ministro tuj estos nuligita de lia sekvanto en ofidado? Se tiel

estus, kio estus okazinta kun ĉiuj akordoj, konvencioj, traktatoj? Ili devus esti ĉiam renovigataj kun ĉiu nova ministro. Mi ne neas, ke ofte tiel okazas, kiel rimarkas sam. Rollet de l'Isle, sed ne ĉiam kaj ne ĉie. Necesas tamen por tion ĉi eviti, ke decido ne nur ministroj, kiuj malaperas, sed la ministerioj, kiuj daŭras.

Plue diras sam. Rollet de l'Isle, ke neniu progreso estas enkondukita laŭ la taktiko de mi proponita: metra sistemo... Mi respondas: se tiel ĉiam ĝis nun estis, el tio ĉi ankoraŭ ne sekvas, ke tiel por ĉiam estos Cetere io alia estas ekz. kun la mezurilo kaj internaciaj horoj. Metran sistemon oni povas enkonduki en unu lando ne enkondukante ĝin en la alia samtempe, ĉar tiun-ĉi sistemon povas uzi eĉ nur la civitanoj de unu lando inter si, ĉar iu sistemo mezura ĝenerale ĉiam estas necesa inter homoj, kla ajn ĝi estus. Tia reformo prezentas nenian danĝeron por la nacio, se eĉ la aliaj nacioj ĝin ne sekvas. Io alia estas kun la lingvo internacia. Ĝi tute ne estas necesa por unu nacio, se aliaj ĝin ne akceptas, ĉar unu nacio havas sian propran lingvon, kiu tute bone sufiĉas por interna uzo de samnacioj. Enkonduki alian, kiu espereble en estonteco estos uzota, sed en estonteco ankoraŭ ne estas uzata ĉie grandskale, estas argumento por ne-esperanta publiko tute nekonvinka kaj ĉiuj ĝisnunaj provoj tion ĉi fari trovas obstinan, rigidan silenton kaj kontraŭstaron eĉ en tiuj landoj, kiuj ne povas pretendi, ke ilia lingvo fariĝu tiel multe konata ekster la limoj de ilia lando, kiel ekz. franca, angla, germana. Ili preferas eĉ ne sufiĉe lernigi ĝin en la lernejoj de sia lando por havi tujan profiton, se eĉ ne grandskalan, ol grandskalajn uzojn sed en malproksima estonteco de la lingvo ĉie uzata.

Sed ni ambaŭ parolas pri estonteco. Tial nenio certa povas esti dirita kaj proponita. Ni eksperimentas. Se mia taktiko sukcesos, oni gajnas ĉion. Se ĝi malsukcesus ni perdas nenion. Ne nur ni perdus nenion, sed eĉ en tiu ĉi okazo ni iom gajnus: Ni

diskonigus ideon pri esperantismo. Do ni ne malhelpu unu la alian, ĉar ambaŭ taktikoj povas esti bonaj en diversaj cirkonstancoj kaj en diversaj landoj. Se maksimuma ne havos ŝancojn de la akcepto, ni apliku minimuman, la mian pri IEAk. Ni kreu do ĉie

komitatojn por ĝia apliko laŭ la indikoj, kiujn mi donis en mia broŝuro pri IEAk. Francoj fondu tian komitaton ankaŭ en sia lando. Se samideanaro agas solidare, la realigo de IEAk inter 6 ŝtatoj povus esti demando de la plej proksimaj jaroj.

LA NERIMARKITA VOJMONTRILO.

La LKK de XXIX Universala Esp. Kongreso en Varsovio eldonis Oran Libron kies paĝoj 187-221 titolitaj „Paĝoj de Profetaĵoj“ estas enketo inter 37 eminentaj kaj bone konataj gvidantoj de la esp. movado je la demando: kiel ili imagas al si la estonteco de esp. post 50 jaroj, sekve en 1987. La respondoj estas mozaiko de la plej diversaj opinioj, ofte atendindaj kaj prudentaj, sed en sia fin-rezulto krom oble unu de dro Adam Zamenhof, laŭ mi la plej trafa, ili preskaŭ ĉiuj vidas antaŭ si la kurtenon de nebulo tute sen iu vojmontrilo, aŭ maksimume unu metron antaŭ siaj piedoj. Tio ĉi estas vere malĝoja, se la ĝisnuna movado en la opinio de plej eminentaj, energiaj agantoj kvazaŭ rigidigis en la formoj de la ĝisnuna propagandaj metodoj kaj ne vidas aliajn, kiuj garantias la plenan venkon. La predikado pri persisteco, laboro, solidareco, unueco havas kompreneble sian valoron, sed tio ĉi ne sufiĉas. Se ni eĉ ĉiuj en la pli granda grado ol nun posedus tiujn virtojn, malgraŭ tio ni ne multe farus, se mankus la vojmontrilo. Kaj tamen tiu montrilo estas eldedukebla el eldiroj de 37 agantoj. Jen kio estas pli-malpli komuna: 1) estas utopio voli esperantigi la multmilionajn naciojn nure per la kursoj organizitaj en dungitaj societejoj esperantaj, 2) oni povas esperantigi ilin nur per deviga instruado de esp. en la lernejoj per la fakaj instruistoj salajrataj kiel ĉiuj aliaj kaj egalrajtaj kun ili. Kaj tie ĉi haltas preskaŭ ĉiuj.

Ili ne scias, kiel agi por ke esp. estu devige instruata. Ĉu tio estas tiel malfacila divenebla?

Oni volas sin turni al iu ministro kun la peto, ke li devige enkonduku esp. en la lernejojn. Sed por kio al nia lando tiel larĝskala instruado, se aliaj ŝtatoj la samon ne faras?

Tiun problemon solvas ideo pri Interŝtata Esperanto-Akordo, t. e. pri la santempa enkonduko en la lernejojn de esp. komence en ses ŝtatoj, kiuj promesas ĝin devige instrui, se aliaj la samon promesas. Kial ĉiuj eminentaj agantoj haltis antaŭ tiu barilo? Ĉar tiu ĉi ideo ne estas popularigita kvankam oni laboras pri ĝi jam de 1920 (pli intensive de 1922).

Estis farita unu eraro: Oni ĉion en estinteco tro alcentrigis en unu mano anstataŭ transdoni la tutan laboron kaj dividi ĝin inter la specialaj naciaj IEAk-komitatoj en ĉiuj landoj, kiuj ĉe si klopodus varbi siajn ministrojn por tiu ĉi celo. Post sukcesiga laboro de dro Edmond Privat en 1922-1928 dum la direktorado de Robert Kreuz nenion, aŭ preskaŭ nenion, faris por tiu ideo dum 10 jaroj, kvankam tiu ĉi aganto laboris ĝis la trasangumo de la cerbo. Sed li tro multe da negocoj volis alcentrigi en unu mano kaj per tio ĉi la sendube plej grava „movado en esp. movado“ estis mortdormigita por la tutaj jaroj.

Nune la procedo estu decentraligita. Ekspeda centro estu en Genevo, kiu la tutan penadon de IEAk antaŭ jaroj komencis, kaj kie estas Ligo de Nacioj, kiu altiras multajn ministrojn kon kiuj oni povas eventuale paroli pri IEAk, kvankam la sorto nin gardu antaŭ la ripeto de la eraroj submeti al ilia neprepariteco kaj malkompetenteco la ideon pri IEAk. En Genevo estos la dissendejo de la komunikoj kaj sciigoj al ĉiuj organizacioj naciaj, sendepende de iliaj simpatioj al UEA aŭ IEL. Sed efektive ne estos unu centro, sed multaj naciaj centroj, kiuj zorgos ĉe si pri IEAk kaj alsendados la raportojn pri ilia laboro al aŭtoro de la ideo, kiu entreprenis gvidi ĝin ĝis la fina venko. Mi resumante ĉion sendos la cirkulerojn al Genevo, de kie oni ilin pluen dissendados. Jen la plej simpla kaj laŭ mi la plej bona procedo: multaj centroj kun plena labora aŭtomomio.

Kiam mi retrospektive trarigardas tion ĉi, kion la esperanta mondo ĝis nun faris, laboron efektive grandegan, mi konstatas kun miro, ke kvankam oni konsideris la problemon pri la venko de esperantismo kiel la demandon de estonteco. La rigidigo de la formoj de propagando kaŝis kaj perdigis al esperantistoj la grandajn perspektivojn kaj celojn tiel, ke ofte oni zorgis pri malgravaĵoj, banalaĵoj kaj al kutimiĝadis komplete al kurranta stato de la movado. Unu-flanke registre vigla vivo interna de klubejoj kaj societoj, aliflanke obstina indiferenteco, kiel ĉe antikvaj romanoj ne komprenantaj kreskantan kristanisman.

Ĉu ia-grade ne estas interesa esprimo pri „dum-vivaj membroj“? Ĉu dum la tuta vivo de iu membro nenio ŝanĝiĝos tiagrade, ke tio ĉi povus malaktualigi la tutan membran „dumvivecon“? Ĉu ĉiuj niaj zorgoj ne daŭros ankoraŭ ne la vivon, sed dekelkajn jarojn? La ne-sufiĉe disvolviĝinta imaginemo estas ofte la kaŭzo de tiu-ĉi ridiĝo de la ĝisnunaj formoj de propagando, ekster kiuj iuj samideanoj opinias, ke kiel nun estas, tiel estos ĉiam rikoltado? El semoj ekĝermis jam la spikar-kampoj. Nun prenu la IEAk-falĉilojn en la manojn kaj ekmarŝu ĝoje al la rikolto!

Alia bildo: Sekretaj kunvenoj de kristanaj katakombaj societoj funebraj. Malmulte scias pri ili la roma ŝtato kaj tio ĉi, kion ĝi scias, apogiĝas je falsaj raportoj. Dum la tempoj de Publius Aelius Hadrianus (117-138) oni ankoraŭ ne komprenis la kristanisman, intermiksante ĝin kun la kulto de Sabazio, kvankam la tiama kristanismo faris jam grandajn progresojn. Oni ne volis kredi al ĝia forto. Kaj jen dekreto de Konstantino-kaj finiĝas la katakombaj societoj! Kristanismo fariĝis venka.

Niaj esp. kluboj, societoj estos organizacioj, pri kiuj la vasta popolo ne multe scias kaj ofte ne ĉiam bone, eĉ false. Kaj tamen alproksimiĝas la tempo de dekretoj

en diversaj landoj. Veraj dekretoj de novaj Konstantinoj.

Jen alia bildo: En katakombaj societoj dormas kavaliroj de verda stelo. Ili rigidiĝis en la propagandaj metodoj. Ili dormas, iuj el ili eĉ mortprofunde. Sonĝante liaj lipoj ripetas: „paŝo post paŝo, post longa laboro...“ Sed ĉu vi jam tute forgesis pri „gloro“?

Ho! La sorto donu al mi la trombonojn, ke mi al vi, dormantaj kavaliroj de verda stelo, ekkantu tra ĉiuj landoj la veksignalon al la ekmarŝo el viaj katakombaj societoj: Revantoj pri espero, la dormantaj kavaliroj: VEKIĜU, VEKIĜU!

Ĉu vi min aŭdas sufiĉe forte? VEKIĜU! Flamantajn torĉojn de la sankta ardo mi volus ĵeti en viajn korojn por ke vi ekflamu plenspirite kaj diskonigu al la mondo ĝoigan sciigon:

For la nebuloj! Antaŭen rekta-voje al la triumfarko de la esperantistaro! Plenforte elstreĉu la flugilojn! Ho! Kiel potencaj vi povus esti, kiel potencaj, se vi tiaj volus esti, se vi komprenus la veksignalon de nova naskiĝanta epoko.

Kiel varme mi dezirus, ke vi ekkomprenu la vojmontrilon!

Vekiĝu! Vekiĝu!

dro Antoni Czubryński.

Juvelo de pola naturo: „Pieniny-montoj“.

Vera miraklo de naturo.

Pola pejzaĝo posedas tiel grandan kvanton da diversaj koloroj kaj nuancoj, ke, se per unu rigardo ni povus ampleksi la tutan polan teron, ni ricevus impreson, ke antaŭ niaj okuloj dissterniĝis pitoreska kolekto de ĉiaj ideoj, kiuj en imagoj de multaj homoj ekzistas nur kiel senenhavaj nomoj. Iu eminenta artesploristo, Franco, nomis Polujon pitoreska lando — kaj en tiu vorto enfermiĝis tuta enhavo de la pola pejzaĝo.

Kaj se ni, trakurinte pejzaĝon de nia pitoreska tero de Gdynia kaj Pomeranio, tra arbarplena Vilna teritorio, tra zumanta per tritikkampoj Mazurujo, tra montetplenaj ĉirkaŭaĵoj de Kielce kaj Sandomierz, ni atingus per okuloj suden, tiam sur horizonto videbletiĝas antaŭ ni potenca, rokplena myro de Tatroj, formanta naturan limon inter Ĉeĥoslovakujo. Sed antaŭ ol nia rigardo atingos tiujn ĉielotuŝajn grandegulojn, kaŝantajn siajn suprojn en maro de nebuloj kaj nuboj, ni direktu nin al Pieniny-montoj, kiuj sterniĝis per nelonga zono sur apudteritorio de Tatra tero.

Pieniny — jen vera miraklo de naturo.

Montara ĉeno, kiu sur relative negranda spaco formas unu el branĉoj de okcidentaj Beskidoj, etendiĝante unuflanke ĝis Spisz (elp. Spiŝ, germane: Zips) kaj Orawa (Orawa), aliflanke ĝis Beskido Sadecki (elp. sondecki, adjektivo devenanta de nomo de urbo: Sącz), formas ununuran en sia speco geologian kreaĵon, konstruitan el sabloŝtonoj kaj ardezoj kovritaj sur randoj de formaĵo per kalciaj kaj kretaj tavoloj. De tio de la vorto „wapień, wapienny“, signifantaj en Esperanto kalcio, kalcia, devenas la nomo de Pieniny-montoj; oni baptis per ĝi zonon de altkreskaj, altencelantaj rokegoj, kiuj en suda parto de tiu montara grupo finiĝas preskaŭ vertikale ĉe la rivero Dunajec.

Kaj Dunajec estas koro kaj ĉefa nervo de Pieniny, reĝidino de polaj montriveroj, kiu, fluante de Tatroj norden, al Vistulo, traĝas tra kreta muro de Pieninoj, formante unu el plej belaj breĉoj ne nur en Pollando, sed en la tuta mondo.

Kiam, elvagoniĝinte en Nowy Targ, stacio kuŝanta ĉe fervoja linio de Kraków al Zakopane, ni okupis lokojn en aŭtobuso, ku-

ranta inter tiu grava ŝtacio apud-Tatra, kaj multaj loĝlokoj, situataj en teritorio de Pieniny, kiel Czorsztyn, Krościenko, Szczawnica, — jam post unu horo ni haltas en Czorsztyn, situanta sur maldekstra bordo de Dunajec.

Kastelo Czorsztyn, memoranta jaron 1249.

Czorsztyn estas bele situata someruma loko, grupiginta ĉirkaŭ rimarkinda altaĵo, kronita per potencaj ruinoj de malnova kastelo.

Kaj tiuj murrestaĵoj, kun bastionoj fiere ĉielen celantaj, memoras jaron 1249, teruran jaron de invado de Tataroj en Polujon. Laŭdire tiun defendan kastelon konstruis reĝo Bolesław la Hontema. Nomo, kiu ŝajnas montri ĝian germanan devenon (de „Zorn“-terura, minaca kaj „Stein“-ŝtono), datiĝas de tiu epoko, kiam la Czorsztyn'a kastelo estis sidejo de rabkavaliroj, kiuj loĝantiĝis ĉi tie en mezepoko, farante oftajn rabistajn atakojn al ĉirkaŭaĵoj. Kiam politikaj rilatoj inter Pollando kaj najbara Hungarujo vigliĝis, jam en XVI jrc., dum regadoj de Ludoviko Hungara kaj Kazimiro la Granda, Czorsztyn fariĝis grava punkto, tra kiu kondukis grava komercista vojo de Kraków al Košice kaj aliaj urboj hungaraj.

Dum la regado de Władysław Jagiello, kiu ofte ĉi tie kunveturadis kun Sigismundo de Luksemburg, en apudaj arbaregoj okazadis ĉasadoj je grandaj bestoj. Post prirabo kaj bruligo de la kastelo en Czorsztyn kaj Kezmark en j. 1633 de Huss-anoj tiu loĝloko perdis sian signifon kaj ne pli frue ol dum la regado de Johano Kazimiro ni trovas en historio de Pollando pluajn menciojn pri la Czorsztyn'a kastelo. Ĉi tie estis kaptata post longa sieĝo Kostka Napierski, estro de ribelanta kamparanaro en apud-Tatra teritorio, kiun oni ekzekutis en Kraków post longaj torturoj.

Hodiaŭ el alta monto ankoraŭ rigardas malproksimen fundamentoj de melankoliaj muroj kaj ŝajnas plenumi sian kelkjarcentan vartadon super la ĉirkaŭaĵo plena de romantika ĉarmo. Sub la kastelo dissterniĝis la vilaĝo, kies loĝantoj pliparte okupas sin per flosado, traveturigante ekskursanojn tra la grandioza montarbreĉo de Dunajec. La boatoj, similantaj per sia formo tiujn indianajn, estas ligataj po tri aŭ kvar en unu vico apud si. Supre oni metas transverse du benketojn, sur antaŭo kaj malantaŭo de tiu „ŝipo“ staras du fortaj flosistoj kun longaj stangoj, — ankoraŭ unu momenton kaj ni ekmoviĝas al mirakla vojaĝo tra Dunajec, kiu nin sur sia ŝaŭmanta ondo portas ĝis Krościenko.

Rezidejo de hungaraj magnatoj.

Vigla fluo portas nin al Niedzica, kies rimarkinda kastelo, devenanta de XIII jrc., regas la ĉirkaŭaĵon. Simile, kiel tiu el Czorsztyn, ĝi pasis diversajn sortojn: en XV jrc. okupis ĝin potenca grafo hungara, Zapolya. En XVI jrc. ĝi famiĝis per malĝoja reputacio de rabista nesto, de kiu rabavidaj kavaliroj faris oftajn atakojn je najbaraj vilaĝoj kaj urboj. Finfine ekposedis ĝin hungara familio de Horvatoj kaj en manoj de iliaj posteuloj ĝi restas ĝis la hodiaŭa tago.

Komencante de Niedzica, Dunajec formas naturan limon inter Polujo kaj Ĉeĥoslovakujo; la maldekstra bordo, la pola, estas multi pli bela, pli pitoreska, foje ĝi leviĝas abrupte supren, foje ĝi subite malaltiĝas. Sur dekstra flanko, sur horizonto nigras Tatroj. Ĝi estas ilia plej alta grupo kun suproj: Garluch, Lodowy (Glacia), Łomnica kaj Krywań.

Kia kontrasto! Ĉe unu flanko ridanta, plena de ĝojo kaj belvetero valo de Dunajec, en kies profundaĵo refajreras la suno, disŝutanta milojn da ĉielarkaj koloroj. Ĉe la dekstra flanko la tero estas egale bela, montetplena, leviĝanta per pitoreskaj ĝiboj de kvadratoj de kampoj kaj kampetoj, el kiuj ĉiu posedas alian koloron, kaj ĉiuj kune formas grandiozan tapiŝon, kovrantan tiun vastan belan teron. Sed — ia malĝojo etendis siajn flugilojn super ĝi, kaj la impreson de severeco kaj teruro kontribuas la silentantaj, envolvitaj per reĝa mantelo de neĝoj kaj nebuloj — Tatroj.

Sed ni flosas pluen. Jam ĉe la riverkurbiĝo montriĝas nova grupo de dometoj, belantaj de malproksime per blanko de muroj. Ni proksimiĝas al la vilaĝo Sromowce Niżne, de kie komenciĝas la plej bela fragmento de nia vojaĝo tra la riverbreĉo de Dunajec en Pieniny.

Super Sromowce elkreskas la majesta muro de Tri Kronoj, la plej alta supro en zono de Pieniny. Brilas en suno de sudo akraj pinglegoj kalciaj, kuraĝe leviĝantaj al la ĉielo de super la malhelverda nigro de la arbaro. Jen ĝustaj Pieniny-montoj. En Sromowce Niżne oni povas rigardi malnovan, belan preĝejon, plenan de monumentoj de popola montarana arto de antaŭ kelke da jarcentoj. Indas atentigi, ke Sromowce Niżne posedas en historio de Pollando malnovan kaj estimindan tradicion, ĉar ili devenas de XIV jrc.

De Sromowce al Krościenko estas du vojoj: unu el ili kondukas alten laŭlonge de la torento Sobczański, tra nekutime pitoreska intermontaĵo de la sama nomo, kaj la alia estas tiu, kiun ni elektis, t. e. tra riverbreĉo de Dunajec. Post dekelkminuta ripozo sur haltejo en Sromowce ni ekflosas,

portataj per viglaj ondoj de tiu plej bela en Pollando monta rivero.

El sub la pinto de Tri Kronoj (982 m) la boatoj rapide defluas apud la Akra Roko. Ĉi tie komenciĝas vera emocio: fortaj ekbatoj de stangoj de niaj flosistoj direktas la boatojn jen al tiu jen al alia flanko. Malantaŭ la randoj de la boatoj la akvo volas kaj transversiĝas, kvazaŭ minacante la kuragulojn, kiuj eniĝis en tiu akvan koridoron, kies rokplenaj, montaj, vertikale al la rivero malleviĝantaj, muroj, plenhaj de sekretaj kavoj kaj grotoj, memorigas ĉiupaŝe la mondon de legendoj pri rabistoj kaj ilia fama estro, Janosik. Jen, preterfluante Okraglica'n, Klasztorna'n, Dunajec rapide turniĝas sudorienten, disbatante la ŝaŭmantajn ondojn kontraŭ la subakvaj ŝtonegoj kaj disversiĝas larĝe malantaŭ la siaspeca roka pordego, formita per malleviĝantaj al la rivero deklivoj. Tie estas — kiel rakontas al ni flosistoj — la fama „salto de Janosik“, loko, en kiu la legenda apud-Tatra heroo estis transsaltinta la riveron Dunajec, furkurante antaŭ aŭstriaĵ gendarmoj. Ree riverkurbiĝo...

Ermitejo de sankta Kinga en Pieniny.

Ni traflosas sub la ermitejo de sankta Kinga, kie sur alta supro staris en mezepoko forta defenda kastelo, detruita de ĉeĥaj Huss-anoj en XV jrc. Sur tiu loko, kie restis nur kelkaj grandaj ŝtonegoj, estantaj restaĵoj de kastelaj ruinoj, konstruis al si malgrandan kabanon pia monaĥo, Władysław Stachura. Post morto de la monaĥo, monaĥo el Poznań'a Provinco fariĝis loĝanto de la ermitejo, kaj en tiu senhomejo li pasigas la tempon preĝante kaj meditante, farante ankaŭ multajn objektojn el ligno laŭ montarana stilo. Trifoje tage sonorilo laŭtiĝas per metala sono super Pieninaj suproj. La ermitejo de sankta Kinga, kie troviĝas elhakita en roko kapeleto kun patronino de tiu ermitejo, skulptita de unu el lokaj montaranoj, estas multe vizitata de aro de turistoj, ĉi tien ekskursantaj. La vojo al la ermitejo kondukas tra densa, kelkloke humida arbaro, plena de fagoj, abioj, piceoj, kun sube kreskanta abunda musko, junipero kaj filiko.

Videbliĝas Spisz kaj Orawa.

La smeraldaj ondoj portas nin pluen, bruas kvereleme, kvazaŭ minacante, ke ili nin superverŝos, dronigos. Sed vanaj iliaj minacoj! Jen malantaŭ la muro elkreskas majesta kupolo de Sokolica-pinto (764 m), montrante sin al ni en sia plena beleco en radioj de subiranta suno.

Sed, se ni surgrimpos la pinton de Sokolica, al niaj okuloj montriĝus la neforge-sebla vidaĵo de la volvita kelkfoje banto de Dunajec, kiu tratabiĝas kun laŭta bruo tra mallarĝa roka gorgo. Cirkaŭe de ni — ĉielo kaj ĝoja verdaĵo de arbaroj, kreskantaj sur montaj deklivoj. La tuta cirkaŭaĵo videblas kvazaŭ sur mano, ĝi altiĝas kaj malaltiĝas per pitoreskaj montetoj, kaj finiĝas en horizonto per fantomantaj en blua foraĵo Tatroj. La vidaĵo de tie estas ankoraŭ pli bela, ol de la supro de Tri Kronoj, ĉar kvankam de tie estas vidataj teroj de Spisz kaj Orawa, altaĵoj de Magóra kaj tutaj Tatroj — kvazaŭ sur manplato, kvazaŭ tie Dunajec disfluas per pli larĝa kaj vasta, ol ĉi tie, rubando, la beleco de la pejzaĝo el supro de Sokolica fiksiĝas en memoro de turisto per maniero pli plena kaj restigas neforviŝeblan impreson.

Kaj jam — ni traflosis sub Hukowa Rokego, preterpasante algluitan al la dekstra bordo doganistan postenon. Nun jam ambaŭ bordoj de Dunajec estas polaj. Ni flosas nun al Krościenko, restigante dekstraflanke vojjon, kiu kondukas al unu el plej grandaj niaj saniglokoj, Szczawnica (Ŝĉawnica), situanta de ĉi tie neplene tri km. Ĉi-tiea loĝantaro estas parencoj de montaranoj el Zakopane. Ili okupas sin per flosado, per transportado de ligno, per kulturado de kampoj, sur kiuj la ŝtonplena grundo malavare naskas la plej necesajn produktojn. Sed la malmola batalo kun la elemento hardis ilin, faris ilin veraj sinjoroj de tiu tero. En naturo de pola montarano kuniĝas ĉiuj plusaj ecoj: bonvolemo por proksimuloj, komplezemo por fremduloj, fiero kaj nobleco, profunda kredo kaj vera, montarana fantazio. El tiu fantazio kaj kredo ekestis tuta eco de kredaĵoj, moroj, kaj superstiĉoj, kiuj ne malgrandigante sincere kaj fervore disvastigitan kredon, konsistigas karakterizajn ecojn de vivo de la montarana medio.

Montaranoj de Pieniny.

Vesto de Pieninaj montaranoj malmulte diferencas de kostumo de aliaj apud-Tatraj montaranoj. La samaj malvastaj pantalonoj kun tiu diferenco, ke „parzenice“, t. e. brodaĵoj sur femuroj, estas alikoloraj. La samaj, rondaj ĉapeloj, kun akcipitra aŭ agla plumo. La samaj ŝafaj mallongaj peltaĵoj, nomataj „guńki“, riĉe ornamitaj per brodaĵoj. Virinoj survestas korsajojn kaj korsetojn, same riĉe broditajn kaj ornamitajn. Sur piedoj: ŝuoj, nomataj „kierpce“. Stofon por vesto-preparado oni havigas al si propramane: ŝafa lano, lino, kanabo. Aliajn aĵojn oni aĉetas dum foiro, kiu ĉi tie okazas unufoje dum du semajnoj, kiam oni povas ĉion aĉeti,

komencante de fromaĝoj, „bryndza“ (ŝafa fromaĝo), mielo kaj planta oleo, kaj finante ĉe belaj popolaj produktaĵoj el ligno, tolo aŭ vitro. Montaranoj sukcesas precipe en pentraĵoj sur vitro, kaj produktaĵojn de tiu artindustrio, ankoraŭ de antaŭ jarcentoj, oni povas vidi en multaj preĝejoj en Spisz, Orawa kaj Pieniny. En Krościenko, kies fondiĝo datiĝas laŭdire de tempoj de S-ta Kinga, belaj verkoj de popola arto ekzistas ĝis la hodiaŭa tago en preĝejo, fondita en j. 1665. Tiu urbeto, kiu nuntempe aranĝas foiron dufoje en monato, posedis privilegion jam en j. 1569, permesantan aranĝi ilin dufoje... jare dum Pentekosto kaj en tago de ĉiuj Sanktuloj.

Krom Zakopanė kaj Krynica, Szczawnica estas la plej granda kaj plej bone aranĝita enmontara sanigejo en Pollando. Ĝi estas belege situata sur montodeklivoj kaj posedas kelkajn mineralajn fontojn, kiuj altiras de la tuta lando pulmomalsanulojn kaj tiujn pri

digestorganoj. De Szczawnica, kiu, krom siaj valoroj kurac-sanigejaj, estas konata pro bela situo, kondukas diversaj turistaj vojoj. Precipe bela estas intermontaĵo Homole, troviĝanta en distanco de kelkaj kilometroj de la sanigejo.

La loĝantoj de Pieniny laboras peze, ĉar de la senfrukta tero de Pieniny oni devas elŝiri la ĉiutagan panon nur en peza ŝvito. Estas ankaŭ tiaj, kiuj serĉante la panon migras en la vastan mondon. Unuj restas en malproksimaj landoj, aliaj revenas en la patrujon.

Bela estas la Pienina tero, la tero de fortaj ventoj, de altaj rokoj, de la bruanta Dunajec-rivero kaj de malmolaj homoj. Indas ekkoni same la naturon, kiel ĝiajn infanojn, de kiuj devenas multaj eminentaj artistoj, pentristoj, muzikistoj kaj poetoj. Kaj ĉiu, kiu tiun terangulon foje ekvidis, forlasante ĝin, promesas, ke tien li revenos. Kaj la promeson li plenumas.



DR LEOPOLD DREHER.

LINGVA ESPLORO.

(Lingva konkurso por ĉiuj).

Mirinda estas la persisteco de Andreo Ĉe, kiu en ĉiu numero de sia bonega „Praktiko“ montras en la artikolo „Ni lerru per la eraroj“ anonime, t. e. ne dirante la aŭtoron, la multajn erarojn faratajn en la gazetoj. Li eĉ ne diras la fonton, en kiu li trovis tiun aŭ alian eraron. Mi volas imiti la bonan metodon de Ĉe (same kiel mi volonte imitas la bonan instrumentodon de Ĉe...).

1) Ĉion mi tradrinkis. Ĉu la frazo estas bona? Ne, la bona frazo estas: ĉion mi fordrinkis.

2) Mi ne kuraĝis enrigardi en la okulojn de... Sufiĉas: rigardi.

3) Tolajon lavis al ni iu virino, kiu estis salajrita ankaŭ de la menciita komitato. Laŭ mia opinio salajrata estas multe pli ĝusta.

Sed, karaj miaj, mi ne daŭrigos mian hodiaŭan lingvan esploron en la maniero de nia Ĉe. Mi proponas al vi, ke vi mem trovu la erarojn. Nome, mi prezentos al vi 15 frazojn kaj bonajn kaj malbonajn: bonvolu mem trovi, kiuj el ili estas malbonaj kaj kial!

1) Post la severega vintro alvenis escepte varma printempo.

2) Iam B. donis al mi almozaĵon kaj li ne rekonis min.

3) Per malforta voĉo ŝi petas Karlon, por ke li donu al ŝi akvon.

4) Iu neforigebla forto pelis min al la hejmo.

5) En la pordego renkontis min la filino de nia domzorgisto.

6) Iru sinjoro pli rapide al via hejmo.

7) Oni velis forpreni de mi la infanon. Mi ne permesos. Eble mi redonus lin al bonaj homoj por edukado.

8) Mi respondis, karesante lian kapeton per la unua mano, kaj per la dua volante elŝiri la koron el mia brusto.

9) Mi havis nek unu groŝon.

10) Mi ne memoras kiam mi havis tiom da elalmozita mono.

11) En la manoj mi tenis la komplete maluzeban ĉapelon.

12) Mi decidis reveni al la loĝejo ne pli frue ol post la noktomezo.

13) Li ofte atendas min ĝis la dua post la meznokto.

14) Antaŭ ĉio mi ŝlosis la pordon.

15) Mi eneris en la kolonialvendejon.

La plej bona „kaptinto“ de la eraroj estos nomcitata en la januara numero de Pola Esperantisto. La „kaptitoj“ estas sendotaj ĝis la 1-a de januaro 1938, plej malfrue, al la redakcio de P. E.

BIBLIOGRAFIO.

La Brita Esperanto-Asocio alsendis por recenzo tri novajn librojn. Mi eble intermiksas la nomojn, ĉar rekte dirante la surskribo estas: The Esperanto Publishing Company, Ltd. Anglujo - Heronsgate, Rickmansworth (Herts) Anglujo.

Cio aĉetebla ĉe: Internacia Esp. Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).

El mia vidpunkto estas mirinde, ke Britaj Samideanoj, kiuj ne tre bezonas, ŝajne, nian Esperanton tiel vigle subtenas la ideon de nia komuna lingvo. Estas vere imitinda ekzemplo por aliaj popoloj, kies lingvo ne estas tiamaniere disvastigita, kiel la angla.

Tia estas mia opinio, sed antaŭ ĉio mi devas fari mian oficon, kaj preparoli la alsenditajn librojn.

VIVO DE ZAMENHOF de Edmond Privat. Dua eldono. Ilustrita kaj bindita. Prezo 3 ŝ. 6 p. Afranko 4 p. Belaj fotografaĵoj de L. L. Zamenhof, lia naskodomo, tobo en Varŝavo, kaj kelkaj aliaj. Ĉiu, kiu ne konas la unuan eldonon, nepre devas tralegi interesegan priskribon de la genia vivo, priskribita de unu el plej konataj amikoj de la Majstro. La unua eldono ne entenas fotografaĵojn kaj pro tio la dua estas tre interesa ankaŭ por tiuj, kiun konas jam la unuan. Mi tre rekomendas tiun interesan libron.

LA VIVO KAJ KONCEPTO DE LA SOCIETO DE AMIKOJ. Prezo unu ŝil. afr. 2 pencoj. La celo de ĉi tiu libreto estas prezenti en mallonga formo kelkon el la baza pensado de la religia Societo de Amikoj: nome de la kvakera interpretado de la kristana vivo kaj kredo. La Societo konceptas kristanecon esence vojo de la vivo, kaj lasas por la formulado de siaj kredoj nur duan lokon.

MURDO EN LA ORIENTA EKSPRESO de Agatha Christie, Nro 1 de la Epoko Libro Klubo. 192 paĝoj. Prezo por membroj de la libroklubo 1 ŝil. por nemembroj 2 ŝil. Interese skribita en bona korekta Esperanto.

Libroklubo Epoko eldonis jam kelkajn interesajn librojn esperantlingve. Estas dezirinde, ke ni havigu la eldonaĵon dum la venanta libro-tago.

*

Literatura Mondo eldonis treege interesan libron de H. W. Van Loon tradukitan el angla lingvo: **RIGARDU LA TERON.** Ĉi tiu libro estas la dua el la serio B. de Asocio de Esperanto Libro-Amikoj. Estas samtempe la kvindektria libro eldonita de Literatura Mondo kaj la tria volumo de la arto-sciencia serio de AELA 1935.

La aŭtoro difinas la geografion: studo de l' homo dum lia serĉado pri nutraĵo, ŝirmejo kaj libera tempo por si kaj sia familio kaj provo por trovi la vojon, en kiu la homo aŭ adaptiĝis al sia ĉirkaŭaĵo, aŭ refasonis sian fizikan ĉirkaŭaĵon, por ke li estu komfortiva kaj bone nutrata kaj feliĉa konforme al sia limigita forto.

Estis vere dirite, ke ĉe la tablo de la Sinjoro troviĝas ankaŭ tre strangaj gastoj, inter kiuj, kiuj lin amas: kaj vere ni trovas nian planedon loĝata de stranga kaj eksterordinara sortimento de kunpensionuloj. Multaj el ili, ĉe la unua konatiĝo kun ili ŝajnas posedi tre malŝatindajn kutimojn kaj ĝeneralajn karakterojn, kiajn ni preferus ne trovi ĉe niaj infanoj. Sed 2000 milionoj da homaj estaĵoj, eĉ se ili ne ludas tre gravan rolon, kiam ili estas pakitaj en kompare malgrandan lignan keston (1 kuba kilometro), estas tre respektinda nombro da homoj kaj inter ili devus sendube, esti la plej larĝaj ebloj por ĉiuspecaj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj eksperimentoj. Ŝajnas al mi, ke tiuj eksperimentoj meritis nian atenton antaŭ ĉio alia... Ĉar monto, kion ajn oni diros, estas nur monto, ĝis kiam homo ĝin ekvidis kaj liaj piedoj ĝin surpaŝis, kaj ĝis kiam ties deklivojn kaj valojn ekokupis kaj pribatalis dekduo de generacioj de malsataj koloniantoj.

Jen kelkaj vortoj el la novmaniere komprenata geografio. Ĉu ne leginda eĉ legenda libro!

Literatura Mondo eldonis okaze de la Universala Esp. Kongreso en Varŝavo **specialan n-ro** dediĉitan al la pola literaturo kaj arto. Unuan paĝon komencas Pola Historio de M. Wajsblum sub la titolo: Tra Jarcentoj. Tiun parton historian mallonge, sed tre lerte, skizis Dro Wajsblum. Ĉiu eksterlanda samideano povas sin orientiĝi sufiĉe, traleginte tiun paĝon de pola historio.

Sekvas bela kaj majstra traduko de poemo de Mickiewicz: Maryla. Belmont, nia ŝatata tria majstro, kiel kutime, simile al Grabowski, enprofundiĝis en la spiriton de la granda pola poeto.

Sed ne nur tiu unu poemo estas tradukita de Belmont. Sekvas kelkaj aliaj de Mickiewicz, Krasiński k. a. Ne estas eble citi ĉion. Tralegu, samideano, ilin vi mem kaj vi estos kontenta.

La sama n-ro enhavas ankaŭ verkojn de Stefan Żeromski, Kaden-Bandrowski, K. Wierzyński, Pola Gojawiczyńska. Poste sekvas priskribo de pola moderna pentro-kaj skulptoarto, de pola arkitekturo-ĉio ilustrita.

Mi ne povas citi ĉion, ĉar estus necese

havi pli da tempo kaj loko. Entute tiu ĉi n-ro estas interese prilaborita kaj devas sin trovi en la manoj de ĉiu esperantisto, kiu interesiĝas pri nia lando.

ORA LIBRO de la Esperanto-movado; redaktis: V. Bleier — E. Cense.

La leganto trovas en la libro trarigardon pri la unua kvindekjaro de Esperanto. Dediĉante paĝojn al la memoro de pioniroj kaj veteranoj, sekvas interesaj artikoloj pri temoj aktualaj kaj interesantaj ĉiun esperantiston. Legante la libron facile kaj ĝue, vi ekkonas la ĉefajn trajtojn de historio de Esperanto. La interesaj profetaĵoj pri la dua jar-kvindeko de Esperanto pensigas ĉiun esperantiston.

ARGENTA DUOPO. Jubilea libro pri Baghy-Kolocsay. Bela dukolore presita libro. La jubileantoj parolas pri si mem. Oni parolas pri jubileantoj. Teatraĵoj. Poemoj. Scenoj. Muziknotoj — ĉio, kio sufiĉas por aranĝi programajn vesperojn en grupoj.

*

Ne malpli interesa estas la

RAPORTOJ KAJ KONKLUDOJ DE LA PARIZA KONFERENCO PRI ESPERANTO EN MODERNA VIVO. Paris, 14 de majo 1937.

Ni vidas el ĝi, ke Anglujo posedas la senkompare unuan lokon en la lernado de Esperanto. Anglaj kursoj plejparte estas oficialaj kaj devigaj. La sama situacio ne ekzistas en iu alia lando eĉ en Polujo, kie la kvar kursoj estas oficialaj, sed ne devigaj. Krom ili ekzistas nur tri oficialaj nedevigaj: en Olomouc kaj Reichenberg (Ĉenoslovakujo) kaj Voitsberg, (Aŭstrujo).

Fina rezolucio de la Konferenco estas:

La Konferenco Internacia: „Esperanto en Moderna Vivo“ kunveninta en Paris 14—17 majo 1937 sub alta pasonado de S-ro Albert Lebrun, Prezidanto de la Franca Respubliko, en la kadro de la Internacia Ekspozicio „Artoj kaj Teknikoj en la Moderna Vivo“:

konsiderante, ke la moderna vivo postulas facilan rimedon, permesantan al la diversaj popoloj interkompreniĝi,

ke la internacia helpa lingvo Esperanto posedas ĉiujn necesajn kvalitojn laŭ la pedagogia, praktika, scienca kaj kultura vidpunktoj,

petas la Registarojn:

Enkonduki devige la lernadon de Esperanto en la lernejojn por la lernantoj 12—14 jaraĵoj, lernadon, kiu estos lasta paŝo en la unuagrada instruado (plibonigo de la instruado de la gepatra lingvo kaj ebligado de la interkompreniĝo kun la aliaj popoloj), kaj unua paŝo por la duagrada instruado (preparo al la lernado de fremdaj lingvoj).

Speciale interesan libron eldonis Dana **Esperanto-Librojo:**

DAŬRIGA KURSO POST CSEH-KURSO de Margarete Saxl

konata intruistino. Estas Gvidilo por Cseh-kursgvidantoj.

La aŭtorino skribas: Kvankam la daŭrigo-kurso estas multe pli serioza kaj bedaŭrinde tute ne tiel alloga amuza, kiel la Cseh-kurso, mi klopodis konservi la spiriton de la metodo, instruante per konversacia formo, kiu iom dolĉigas al la kursanoj la lernadon de pli malfacilaj gramatikaĵoj.

La aŭtorino estas tro modesta. Al mi ŝajnas la gvidlibro tre alloga skribita, ĉar la libreto enhavas historieton, en kiu ni povas ĉerpi gravan moralon, kiel esperantistoj. La aŭtorino pravas, dirante, ke ni, Esperantistoj, post la lernado restas oftege izoluloj, ne sciante ion unu pri la alia. Esperanto ja estas ne nur lingvo, sed grava ideo, kiu devas pli kaj pli disvastiĝi kaj rekonstrui la nunan homan socion, kiu estas tro malamikema kaj batalema. Ni devas vivi kune en paco kaj harmonio, same, kiel diris la farmisto al siaj filoj. Ni devas doni bonan ekzemplon al aliaj. Dirante tion ĉi, mi sentas min iomete naiva. Sed komprenu min kaj havu bonan volon. Unua paŝo estas: aranĝadi kiel eble plej multe da esperantaj kluboj kaj societoj. Ne resti izolitaj.

*

NIA MONDO-LERNOLIBRO POR INFANOJ: unua volumeto „La malgranda Mondo“. La dua volumeto troviĝas en „La Vojo“ monata gazeto por infanoj.

Libreto verkita de Annie Rebers, ilustrita de T. Langenberg. Eldono de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la Regiono de la Nederlanda lingvo.

Sendube unu el plej taŭgaj libroj destinita por Nederlandaj infanoj esperant- kaj nederlandlingva. Taŭgaj ilustraĵoj bone faritaj.

*

Itala Turista Societo pere de **Ministerio de Turismo** eldonis kaj dissendis belegan propagandan libreton arte ilustritan:

LA KVAR SEZONOJ EN ITALUJO.

Ne unuafoje estas eldonita tiel bele kaj riĉe diverskolora ilustrita gvidlibro. Krom belaj fotografiaĵoj de diversaj italaj regionaj bildoj, ni povas admiri famajn pentraĵojn de italaj pentristoj: Tiziano, Boticelli, Ghirlandajo.

*

Generala Direkcio de Fervojoj Sud-Manguria Fervoja Kompanio (S. M. R.) Muk-

den Manĝurio, eldonis ilustritan, bele eldonitan gvidlibreton:

EK AL MANĜOUKUO!

Ne unuan fojon en Esperanta Turista literaturo aperis simila gvidlibro el Oriento treege malproksima. El tiu ĉi libreto oni povas juĝi grandan paŝon de nova kulturo, precipe japana. El interesaj multaj priskriboj de diversaj regionoj ni citas unu. Tio estas:

Fusun-Branĉlinio, sur kiu sin trovas la plej

TRA LA GAZETARO.

La ĉefa temo de diverslandaj esp. gazetoj estas priparolado de la jubilea Kongreso en Varŝavo. Preskaŭ ĉiuj gazetoj estas kontentigitaj, ke tiu ĉi kongreso okazis en la urbo, kie Zamenhof vivis kaj laboris. Organizo de la kongreso ne estis ideala kaj ne sukcesis je diversaj flankoj.

Sed unu estas certa. Kvankam la kvanto da esperantistoj ne estis sufiĉe granda, tamen la kvalito de laboroj estis kontentiga eĉ en kelkaj direktoj impona. Unuan lokon okupas la Kongreso de blinduloj, kiuj nun marŝas kune, unuiĝintaj, kaj en Esperanto trovis veran internacian apogon. Estis ankaŭ impona rezolucio de instruistaro. Ĉiuj unuanime, same kiel dum la Internacia Konferenco en Parizo, voĉdonis por la deviga enkonduko de Esperanto en lernejojn. Tre kontentiga estas ankaŭ Skolta Movado, kiu evidente disvolviĝas, komprenante internacian valoron de la helpa lingvo.

Franca Esperantisto oficiala organo de la Franca Societo por la propagando de Esp. enhavas krom la priparolo de la Jubilea Kongreso ankaŭ la viziton en Białystok. La vizito multe impresis la ĉeestantaron. Malgranda modesta ligna dometo, kie naskiĝis la Majstro, malriĉa loĝantaro de la malnova parto de urbeto -- sed -- vera Esperantujo. Samideanoj el pli ol 30 nacioj, parolantaj unu lingvon. Efektiviĝas vera miraklo.

Oni vizitis belan palacon de pola nobelo grafo Branicki, kie restas kelkaj malnovaj memoraĵoj de polaj reĝoj, tute ne multaj, ĉar ĉio ĉi estis longatempe sub la rusa regado. Lastatempe Vojevodo Kościalkowski rekonstruis la palacon kaj belan malnovan parkon. La urbo multe plibeliĝis kaj nun estas tute alia ordo kompare al tio, kio estis antaŭ kelkaj jaroj. La urbo famiĝis kiel naskoloko de la Majstro.

Laborkunsidoj postlasis bonan impreson de serioza laborado, kiu devas havi pozitivajn rezultojn.

Internacia Pedagogia Revuo, of. org. de instruistoj Esp. TAGE. Citataj du ekzemploj de imitinda laboro. Fr-ino J. Supichova

grandioza nekovrita karbminejo en la mondo. La minejo ampleksas ĉirkaŭ 68 kvadrataj kilometroj -- 17 km de oriento al okcidento kaj 4 km de sudo al nordo.

Laŭ kalkulo la subtera kvanto de karbo estas ĉ. 1 miliardo da tunoj.

Krom tio estas multaj interesaj konstruaĵoj, ruinoj k. t. p.

Estas aldonita bela Landkarto de Tra-Siberia Eŭropo-Azia Trafiko.

en Praha redaktas mallongan esp. kronikon en la revuo LIST, org. de ĉeĥoslovakaj instruistoj. LIST estas la sola organo, kiu favoras esperanton.

La Gazetara Komitato de Norvega Esp. Ligo pere de sia sekretario s-ro Amsiun Jensen multfoje skribis kaj laŭdis la enhavon de IPR. kaj ankaŭ akiris permeson de traduko el la revuo por aperigo en Norvegaj gazetoj. Jam aperis multaj artikoloj.

Interesa estas artikolo pri la *Danaj Esp. Kursoj* aranĝitaj de Dana Esp. Inst. dum la somero. Partoprenis 82 gesamideanoj el 14 diversaj landoj en la intern. Popollernejo (Altlernejo) de Helsingör. Ĉiuj partoprenantoj loĝis kaj manĝis en la Altlernejo, en agrabla frata atmosfero. La kursoj estis gvidataj de eminenta pedagogino fr. M. Saxl. La kandidatoj vidis ne nur la Cseh-metodon, sed ankaŭ tiun de s-ro Szilagy. Estis aranĝitaj ekskursoj al diversaj vidindaj urboj de Danlando kaj Svedlando.

S-ro A. Gauder priparolas en tre interesa artikolo la instruadan aferon de la Finugraj popoloj. Leginda.

La Lumturo de Esperanto. Nro 43. Red.: Villa Zamenhof. Sisteron. France. Internacia paĝo por Unuiĝo de Esp. Virinoj. Funebra artikolo pri neforgesebla S-ino Borel, kies perdon ĉiuj esperantistoj tiom profunde kundoloris dum Varŝava Jubilea Kongreso. Malmultaj estas la Virinoj, kiuj tiom profundpense oferis sian vivon por la vera Zamenhofa Ideo.

Estas priskribita la kunveno de Esp. Virinoj dum la Jubilea.

Krome angulo por filatelistoj.

Interligilo de P. T. T. Nro 8/9 prezentas unue la Jubilean brazilan poŝtmarkon. Fakaj informoj de diversaj landoj.

Norvega Esperantisto. Nro 8 (Norvega Esp. Ligo). Priskribas la agadon de Unuiĝo de Esp. Virinoj, kiu laboras fervore kaj amikeme en tri landoj: Danlando, Norvegujo kaj Svedujo. Priskribo de la agado de kelkaj norvegaj kluboj, kiuj vigle laboras.

Ni kore salutas la unuan n-ron de la

KOREA ESPERANTISTO

nova esp. organo, redaktata de s-ano Hengvi Hong (190 Johoku co Seoulo, Koreio, Japanujo). Jarabono 2 sv. fr. Kvaronjaro. Kelkaj interesaj rakontoj kaj unuakta komedio.

Bulgara Esperantisto. Oktobro Nro 1. Org. de Bulgara Esp. As.

Internacia S. O. S. Bulteno. Radio-club Esp. de France. Red.: Alglave Michel, Blanc-Misseron (Nord). Francujo.

Radioaŭskultantoj estas petataj sendi leterojn al diversaj landaj radiostacioj, petante pri radiodisaŭdigoj en Esperanto.

Heroldo de Esperanto. Oficiala semajna organo de I. E. L. Eldonanto: Belga Esp. Inst. Antverpeno. Belgujo. Red.: Teo Jung. Scheveningen. Nederlando. Nro 43.

S ro Dance proponas, ke la Esperantistoj organizigu pli taŭge, por ke la uzo de Esperanto estu pli forte disvastigata. Oftege nun kelkaj personoj faras samon. En organizita vivo oni povus pli efike labori.

Regnogermaĵoj nun multe pli ofte parolas pri Esperanto, kvankam kelkaj el ili deklaras, ke Zamenhof elpensis Esp. por helpi starigi la judan mondregadon. Unu aŭtoro asertas, ke en Ruslando, kie regas nova religio de la judismo, t. e. la bolŝevika sangteroro, oni parolas esperantlingve. Ĉu ne estas vera novaĵo? Ni opiniis ĝis nun, ke tie oni parolas preĉipe ruse. La germana publiko vidas el tio, ke la afero nia vivas kaj disvastiĝas. Ĝi brilas por ĉiuj homoj kiel suno, sen la diferenco de politikaj kaj religiaj konvinkoj.

Interesaj estas malgrandaj ĉiusemajnaj refutoj, por la uzo de kontraŭoj.

La Eukaristia Mondkongreso estas tre grava okazaĵo por disvastigi Esperanton.

Nia Gazeto. Ĉefredaktoro Georges Avril. Nice. (29 Av. de la Victoire). Francujo. Kiel kutime interesa kaj enhavplena. Tial mi konvertiĝis al la Budaismo. Mi tralegis la spritan artikolon kaj... ne konvertiĝis... aŭ konvertiĝis je ankoraŭ pli granda malkredemulo. Bonvolu tralegi kaj vi iĝos la sama. Mi ankoraŭ ne tralegis la „De Epifanio ĝis Silvestro“ sed promesas tralegi, ĉar devas esti tre interesa. Malfidela Edzino... tre alloga... **La Medicina angulo** estas skribita de vera amiko de l' homo. Sed la trokredemuloj estas multegaj. Estas leginda: Kompatu la mezan esperantiston. Entute la Gazeto estas ne leginda sed legenda.

Nia Gazeto estas, laŭ mia opinio, la plej interese redaktita esp. gazeto. Sen iu ajn propagando ĝi propagandas Esperanton.

Helena Esperantisto. Monata. Red. Anakreon Stamatiadis. Ateno. (Str. Rodou 21).

Nia malnova Samideano Red. Stamatia-

dis varme subtenas la decidon de Pariza Konferenco enkonduki devige Esperanton en la lernejon. Sekvas la kroniko de la agado de esper. societoj en Grekujo kaj fotografaĵo de geinstruistoj esp. Bela poeziaĵo de Tetmajer tradukita de Grabowski.

Flandra Esperantisto. Of. Org. de Flandra Esp. Ligo. Ĉefredaktoro: A. Pittoors. Antverpen.

Generala Kunveno en Gent kolektis 15 sekciojn. Entute la Ligo nombras 31 sekciojn. La nombro de Ligoj kreskas kaj atingis jam preskaŭ 1000 anojn. Konstatas, ke la vojaĝoj eksterlanden estas tre efikaj kun Verda Stelo. Speciale en Svisujo, Aŭstrio, Italujo oni trovas multajn Verdstelanojn, kiuj plifaciligas la vojaĝon. Interese redaktata gazeto.

Aŭstria Esperantisto. Of. Org. de Intern. Esp. Muzeo, Aŭstr. Esper. As. kaj Esp. Varbadservo por Aŭstrio. Multaj belaj fotografaĵoj, bonega propagando por Esperanto kaj Aŭstrujo.

La Nova Tagiĝo. Bulteno de la samnoma Lovena Sekcio de Flandra Ligo. Red. kaj eld. Lode Cnops. n. 7.

Laborista Esperantisto. Red.: Postbus W. 6. Amsterdam. Ni kun agrablo ricevis la lernolibreton por infanoj, eldonitan de la Federacio. Ni ekscias, ke en kelkaj semajnoj estis venditaj pli ol 1800 libretoj por infankurso. Ni recenzos eble ne tiom severe ol la E. I. Ni tute konsentas kun la eldonisto, ke neniam sufiĉas niaj zorgoj pri instruadiloj por infanoj, kondiĉe ke ili estas taŭgaj.

Per Unuigitaj Fortoj. Ĝen. Revuo de la esp. Movado. M. Movo. Paris-Vanvers. Julien 84. Francujo. Nro 1.

Kia devas esti ĝenerala internacia Esper-Gazeto? La Aŭtoro opinias, ke ĝis nun ne ekzistas taŭga tipo jam de tia gazeto. Mi opinias, ke tiu tipo jam ekzistas kaj mi citos unue: Nia Gazeto de G. Avril kaj la dua Heroldo de Esperanto. Krom tio estas sufiĉe multaj landaj gazetoj. Tute prave diras la Gazeto, ke du Universalaj Kongresoj en estonta jaro estus vera skandalo. Sed nun mankas unu vera gvidanto de la Esp. Movado. Mankas vera Aŭtoritatulo.

Por vekigi la konsciencon tralegu:

Sen Titolo. La Japan-Cina milito sendube alportos al ĉiuj eŭropaj ŝtatoj gravajn ekonomiajn sanĝojn.

La Generala Revuo faras bonan impreson. Interesa gazeto.

Laborista Esperantisto. Barhusgatan. Stockholm. Jen la dua bone kaj bele eldonata Laborista Gazeto.

La Revuo Orienta. Nro 11. Japana Esp.

Instituto. Bela kopio de Leonardo da Vinci. Interesaj studoj kaj verkoj pri la japanalingvo, faritaj en Eŭropo. Studado de jap. lingvo komenciĝas de 16 jarcento. Komencis ĝin la Jezuitaj misiistoj. Estis eldonitaj kelkaj gramatikoj kaj vokabularoj. El novaj tempoj ankaŭ ekzistas kelkaj bonaj libroj eldonitaj de Angloj, Francoj, Rusoj, Germanoj. Vere kortuŝe estas skribita la jubilea Readmono al la 25-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj.

Sed el ĉiuj ĉi turmentoj, la plej akra bato; Tio estas malkonfido inter la gefratoj. Taŭgaj lingvaj rimarkoj.

Regno de Pensoj. De ĉiuj dependa organo de Bono kaj Belo. Esperanto, Mukaĉevo (ĈSR). Nro 6. Esp. Presejo Pražak, Jablonné n. Orl. Pensoj de diversaj aŭtoritatuloj de Komensky ĝis Voltaire.

Verda Revuo. Red. kaj Adm.: Wien VIII. Hermannsgasse 31/26. Aŭstrio. Jam Voltaire diris, ke diverseco de la lingvoj estas unu el la plej grandaj malfeliĉoj de la vivo. Estas vero, sed oni pli kaj pli ofte rimarkas, ke eĉ samlingvanoj ne interkompreniĝas kaj kruele batalas. Belaj ilustraĵoj kaj tre interesaj scienca-popularaj artikoloj.

Bulteno de la Internacia Scienca Asocio kaj la Sekcio de Teknikaj Vortaroj. Organon de Scienco, Industrio kaj Komerco.

Red. kaj Eldonejo: Sro Marcel Daniel Dupuis, Ĝen. Sekr. de ISAE. 56 rue de la Rochefoucauld, Paris 9. Francujo.

Estas malagrabla konstati, ke tiom merita kaj interesa gazeto ne havas sufiĉan subtenon inter la Esperantistaro.

S-ro Rollet de l'Isle, Prezidanto de la Akademio, prezentis raporton el la Kongreso de la Internacia Federacio de la Teknika Gazetaro (Paris 6 — 11 sept. 1937) kaj pe-

tis helpon de tiu komisiono por subteni ĝiajn konkludojn, kiuj estis:

La Kongreso konsiderante, ke unu esperanta eldono, publikigita kun aldono en nacia lingvo, prezentas al teknika revuo agadkampon multe pli vastan, ol tiu en kiu enfermas ĝin ĝia nacia lingvo, kaj ke tiu preskaŭ senlima plivastigo de la rondoj, ĉe kiuj ĝi povas trovi legantojn prezentas pro la ekonomiaj kaj sociaj ŝanĝoj, netakseblan intereson, sed ke la nuna disvastigo de Esperanto, nebliganta publikigi duoblan eldonon necesas, antaŭ ol ĝin entrepreni, pligrandigi tiun disvastigon, kreante tutmondan favoran spiritstaton per ĝenerala kaj ordigata agado en la teknikaj rondoj, invitas la Teknikajn Revuojn alporti efikan helpon al la propagandistoj de Esperanto, publikigante ofte artikolojn pri tiu lingvo kaj oferdonante senpagan reklamon al la teknikaj publikigaĵoj.

Sekvas bone kompilita Zamenhofa adverbaro de Fento Stancl, of. statistikisto de Esp. As. de Nord-Ameriko kun sia fidedela helpanto Roberto Betteridge rad. st. W. J. W. Akron Ohio.

Tuneloj kaj Ponto en Urbegoj bele ilustrita. Novaj elektrodoj indikantaj pH. Paĝo de Teknika Vortaro. Paĝo de Esp. kaj komerco.

Skaut. Ilustrita Org. de Skoltoj en Polujo nro 4. Skolta angulo esperantlingve, gvidata de s-ano Józef Toczyski (Lwów, Polujo).

Dansk Esperanto-Blad Red.: K. Langgaard, Karise.

Ĉinio hurlas. Per Esperanto por la liberigo de Ĉinio. Aperas trifoje en monato. Proviz. adreso: K-do A. Griven, Nr 14 Lane, 169 Carter Road, Shanghai, Ĉinujo.

O. B.

KATOLIKA ESPERANTO MOVADO.

ALVOKO.

Kun ĝojo kaj kun frata amo ni invitas vin ĉiujn, ol ĉiu direkto de la terĝlobo.

Venu por partopreni la solenaĵojn de nia duoble sankta jaro! Venu al Budapeŝt kaj vizitu la Eŭkaristian Kongreson! Venu! Ni ĝoju kune!

Domage nia ĝojo ne estas senmanka. Malserenigas ĝin la zorgo, kiel ni komprenos unu la alian. Nian hungaran lingvon vi ja ne parolas. El inter la viaj, ni konas nur apenaŭ kelkajn kaj la tempo jam ne sufiĉas por lerni nek la nian, nek la viajn.

Tamen ni ne volas, ke ni nur interrigardadu unu la alian senkomprene, sed ni volas babiladi kun vi ĉiuj, senpere kaj amike.

Ni devas do kapti la rimedon, kiu ebligas ĉi tion, ni devas preni je helpo la lingvon Esperanto.

Ni havas ankoraŭ kelkajn monatojn kaj tiuj sufiĉas por ellerni ĝin. Tiuj sufiĉas, ke kiam vi alvenos, ni povu jam interparoladi, kvazaŭ ni estus samlingvanoj.

KARAJ GEFRATOJ! Ni lernas jam amase Esperanton. Alvoku viajn samlandanojn, ke ankaŭ ili lernu ĝin amase! Diskonigu per viaj naciaj gazetoj, per viaj radiostacioj, ke dum la kongreso ĉiu povas bone interkompreniĝi per Esperanto; do se ankaŭ vi amase ellernos la lingvon Esperanto, kiam anstataŭ la lingva haoso, timata, regos ĝenerala interkompreno kaj anstataŭ la muta



*Ĉu, ne forgesis,
 Ĥion, ni promesis?
 Se, vi versojn kaligrafas,
 Vin donac' agrabla trafas.
 Nu, ne skribu por varo do;
 Ni konsilas rapidlegi:
 Ĥianu tempon je l'skribado,
 Ĥi da tempo restas legi.*

Katalogon petu de la
 admin. de „Pola Esp.“

interrigardo kaj ridinda gestado, aŭdiĝos familiara babilado.

Kiel vi jam legis en nia Heroldo de Esperanto, la prepara Komitato de la Eŭkariŝtia Kongreso akceptis oficiale esperanton kaj presigis la eŭkariŝtian broŝuron ankaŭ esperant-lingve, kiun ni volonte dissendas, al ĉiuj, kiuj nin petos pri tio.

Kun samideana saluto:

Hungarlanda Katolika Esperanto Societo.
 Budapest, II., Lánchid-uca 7-9.

*

Deklara datreveno de katolika propagandejo poresperanta.

Dek jaroj forpasis kiam fondiĝis Pollanda Katolika Unuiĝo Esperantista, dank' al la tre ŝatata honorinda pastra moŝto Paŭlo Janik, tiama vikario en Chorzów, Silezio. Dum relative mallonga tempo li sukcesis arigi multe da flamiĝintaj batalantoj por la sankta ideo de katolika Esperanto-movado. Ne ŝparante monon nek tempon, li starigis propagandojn Pol. K. U. E., eldonigis propagandilojn,

disvastigante per ĝi la sanktan ideon inter la katolikaro helpe de la gazetaro nacia kaj religia. Inter kunlaborantoj oni krome nomu la meritoplenan pastran moŝton redaktoron Nikodem Cieszyński, Poznań, pastrojn: Józef Hanaczek T. J., Leon Haroński, Ludwik Haroński, Ludwik Kosyrczyk, Swirtuń, Antoni Troszyński kaj multaj aliaj.

Nuntempe, reorganizinte la propagandojn kunmetante regularon, oni ligas ĝin al la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kaj alvokas ĉiujn katolikajn esperantistojn je la aliĝo. La kotizo estas kune kun la abonprezo por la oficiala organo Espero Katolika nur 6, 40 zł jare. Tuja aliĝinto paganta la kotizon jam nun por la venonta jaro 1938 ricevos ankoraŭ aperontajn ekzemplerojn de la ilustrita riĉenhava monata revuo por la nuna jaro senpage.

Oni aliĝas, mendas, pagas, per **M. Janik, Świerklany, pow. Rybnik, Śląsk. P. K. O. 303.779 Katowice.**

En la plano de instruado de eksterlandaj lingvoj la estraro de „Dopolavoro Marittimo“ (mara postlaboro) de „Conte Grande“ enmetis ankaŭ Esperanton.

Tiun ĉi kurson gvidos la samideano **prof. Agostino Stellacci**, kapelano de sama ŝipo. Li fervore propagandas nian movadon kaj faros paroladon pri Esperanto al la ŝipanaro kaj eble al la vojaĝantoj.

OBNIŻKA ABONAMENTU!

Kaŭdy abonujacy na rok 1938 miesięcznik „Pola Esperantisto“ wpłaca do dnia 31 grudnia 1937

tylko zł 6.50.

Po tym terminie abonament wynosi zł 8.— rocznie.

Korzystajcie ze zniżki!

Równocześnie komunikujemy, iż zalegającym z wpłatą abonamentu za rok 1937 wstrzymujemy wysyłkę miesięcznika z dniem 1 stycznia 1938. Prosimy więc uprzejmie o wyrównanie zaległości.

ABONO: jare zł 8.—, duonjare zł 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł 6.—. Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero zł 0.70, duobla zł 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł 30.—, 1/4 paĝo zł 15.—, 1/8 paĝo zł 10.—. Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł 1.—.

PRENUMERATA: rocznie zł 8.—, półrocznie zł 4.—. Dla Towarzystw i grup esperanckich rocznie zł 6.—. Zagranicą: 7 fr. szw. Numer pojedynczy zł 0.70, podwójny zł 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł 30.—, 1/4 strony zł 15.—, 1/8 strony zł 10.—. Korespondencja: małe ogłoszenia z 10 słów (prócz adresu) zł 1.—.

Przekaz rozrachunkowy: kartoteka Nr 29, Kraków 2. — Konto P. K. O. Nr 406.60.

Wykonano w Drukarni Miejsk. Muz. Przemysłowego w Krakowie. Redaktor odpowiedzialny: Dr Leon Rosenstock.

